Wilhelm Busch,

Die Fliege

Dem Herrn Inspektor tut's so gut
Wenn er nach Tisch ein wenig ruht.

Da kommt die Fliege mit Gebrumm
Und surrt ihm vor dem Ohr herum.

Und aufgeschreckt aus halbem Schlummer,
Schaut er verdrießlich auf den Brummer.

Die böse Fliege! Seht nun hat se
Sich festgesetzt auf seiner Glatze

"Wart nur, du unverschämtes Tier!
Anitzo aber komm ich dir!"

Behutsam schleicht er nach der Tasse,
Dass er die Fliege da erfasse.

Perdautz! - Darin ist er gewandt -
Er hat sie wirklich in der Hand.

Hier schaut er nun mit großer List,
Wo sie denn eigentlich wohl ist.

Surr! - Da! Sie ist schon wieder frei
Ein Bein, das ist ihr einerlei

Jetzt aber kommt er mit der Klappe,
Dass er sie so vielleicht ertappe.

Und um sie sicher zu bekommen,
Hat er den Sorgenstuhl erklommen.

Rumsbums! Da liegt der Stuhl und er.
Die Fliege flattert froh umher.

Da holt er aus mii voller Kraft
Die Fliege wird dahingerafft.

Und fröhlich sieht er das Insekt
Am Boden leblos ausgestreckt.

...

Wilhelm Busch,

La muŝo

tradukita de laborgrupo 100 jaroj Esperanto en Kronach

Jen, post la manĝ', kiam li satas,
la inspektor' ripozi ŝatas.

Sed venas muŝo, kiu zumas
kaj la orelon ĉirkaŭumas.

Ektimigita el dormeto,
la viro diras: "Nun kvieto!"

La muŝo nun, vi tion vidas,
sur lia kalva kapo sidas.

"Mi kaptos vin, malica besto!"
li krias kun minaca gesto.

Al tablo iras li singarde,
sed psike bolas li jam arde!

Spektaklo jen, rigardu lin,
li kun lerteco kaptas ĝin!

Nun, post la ĉas' kontrolas li
kaptitan beston tie ĉi.

Jen! Zum! La muŝo pro teruro
sin liberigas, sed sen kruro.

Sed nun li kun batilo venas,
la vervon li ne plu retenas.

Do, kaj por certe kapti ĝin
sur seĝon li starigas sin.

Sed krak! La seĝo tuj rompiĝas,
la muŝo ridas kaj foriĝas.

Kaj nun per sia tuta forto
la muŝon batas li al morto.

La inspektoro kun kontento
"Mi venkis!" diras li, sen pento.

...

Erquicklich ist die Mittagsruh,
Nur kommt man oftmals nicht dazu.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Wilhelm Busch *(∗1832-04-15 – †1908-01-09).*

Arg-971-1953 (2014-03-03 23:08:33)

Pri la poeto Wilhelm Busch vidu la vikipedian retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Busch`*.*
La teksto de la poemo troviĝas sub `http://www.wilhelm-busch-seiten.de/werke/bilderbogen/fliege.html`*.*

La paŭzo ofte taŭgas pli,
se muŝo estas ne ĉe vi.

Traduko de la Germana poemo "Die Fliege" de Wilhelm Busch *(∗1832-04-15 – †1908-01-09) en Esperanton de laborgrupo 100 jaroj Esperanto en Kronach.*

Arg-971-1954 (2014-03-04 13:41:36)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la GEA-revuo "Esperanto aktuell", n-ro 2014-1. La tradukon faris komune la partoprenintoj de la festo "Cent jaroj de Esperanto en Kronach (Bavario)".